# THE BRITISH ESPERANTIST

OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.)

ISSUED ON THE 24TH OF EACH MONTH. SUPPLIED TO MEMBERS ONLY.

Vol. XXVI.—No. 301. MAY, 1930.



THE

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

(INCORPORATED).

142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

*Telephone: Holborn* 4794.

*Telegrams: "Esperanto", Westcent, London.*

*Late Hon. President:* DR. L. L. ZAMENHOF.
*Hon. President:* J. M. WARDEN.
*President:* JOHN MERCHANT.
*Hon. Vice-Presidents:* G. D. BUCHANAN, MISS E. A. LAWRENCE.
*Vice-Presidents:* J. J. BOUTWOOD, J.P., PROF. W. E. COLLINSON, M.A., Ph.D., W. M. PAGE, S.S.C.
*Hon. Secretary:* ROBERT ROBERTSON.
*Hon. Treasurer:* PAUL BLAISE.
*Secretary:* MONTAGU C. BUTLER, L.R.A.M.
*Business Manager:* CECIL C. GOLDSMITH, F.C.I.

Office Hours: 9—5.30. (Monday till 8.30, Saturday till 12.30).

The Association consists of Fellows, Members, Affiliated Groups, and Federations. The Annual Subscriptions are:— Fellows, 21s.; Members, 5/-; Junior Members (under 18), 2s. 6d.: Life Fellowship, £12 : 12 : 0 Life Membership £5.

A list of Affiliated Federations and Groups will be sent on application. Group Affiliation fee: 6d. per member per annum; minimum, 5/-.

**This Official Organ is sent each month to Fellows and Members.**

**"INTERNATIONAL LANGUAGE."**—A monthly magazine in English, devoted to the study of the International Language problem. Includes instructional articles on Esperanto and *The Esperanto Student*, a supplement for beginners. Subscription, 2/6 per annum, post free.


## XXI-A BRITA KONGRESO, Nottingham, 6-9 Junio, 1930.

La antaŭsignoj montras, ke ĉi tiu kongreso estos tre sukcesa. Jam aliĝis 150—eble rekordo por la dato. La organizantoj deziras danki la multajn amikojn, kiuj skribis bondezirojn.

Por helpi la kongresan kason oni vendas (1) duonfuntan paketon da Kongresaj Ĉokoladoj, kun portreto de S-ro Merchant, (1ŝ.), kaj (2) aron da Poŝtkartoj de Nottingham, kun Esperanta teksto (1ŝ.).

Ĵus aperis 36-paĝa Gvidlibro, kiu estas neordinare interesa, belaspekta, kaj havinda.

Multaj kongresanoj ankoraŭ ne sciigis sian deziron pri loĝado. Frua skribo estas tre konsilinda. Oni povas provizi privatajn ĉambrojn, kun lito kaj matenmanĝo, po 7/6, 6/6, 5/6, 5/-, 4/-, 3/6, aŭ 3/- por persono, laŭ distanco de la kongresejo kaj aliaj cirkonstancoj. En kelkaj okazoj estas rabato por du samĉambranoj.

*Lastaj aliĝintoj:* F-ino E. E. Venn, Beeston; M. C. Butler, Kingston; S-ro Pratt, Dundee; S-ro Gilfillan, Dundee; H. Ingham, Chesterfield; B. Long, London; F-ino Hancock, Hove; I. H. Wright, Birmingham; D-ro C. B. Fawcett, London; S-ro Naylor, Nottingham; F-ino Wilford, Nottingham; S-ro Goldsmith, Romford; Ges. Hall, Gateshead; A. Bowker, Sheffield; J. Leakey; Hatfield; F-ino A. E. Howlett, Bushey; Ges. Megahy, Preston; F-ino Davis, Wisbech; L. Evans, Merthyr Tydfil; H. J. Nunn, Bournville; S-ro Taylor, Riddings; E. Beeves, Swanwick; S-ro J. A. Hodges, New Zealand; F. W. Hipsley, Grantham; F-ino A. Weeks, London; Ges. E. Soulsby, Malton; Ges. G. Porteous, Glasgow; S-ro Kitching, London; F-ino W. Carter, Bradford.

ROBERT ANDERSON,
72, Wilsthorpe Road, Long Eaton, Nottingham.
**Honora Sekretario.**

## XXV-a SKOTA KONGRESO, Dundee, 5—7 September, 1930.

Ni ricevis jam nun la programon de ĉi tiu kongreso. Evidente la loka komitato vigle laboris.

*Vendredon:* 5 Septembro, okazos Civita Akcepto en Victoria Art Galleries, 8.0.

*Sabaton:* 6 Septembro, je 10.0, ekskurso kaj lokaj vizitoj; posttagmeze konsilantara kaj ĝenerala kunvenoj, vespere koncerto, vespermanĝo, kaj dancado.

*Dimanĉon:* 7 Septembro, ekskurso al Broughty Ferry. Je 3.0 Diservo en Kongregacia preĝejo, Newport. Predikos Pastro J. A. Lees, M.A.

Plena programo kaj ĉiuj informoj ĉe la sekretario, S-ro Graham Paton, 62 Forthill Drive, Broughty Ferry.

### KRONIKO FEDERACIA.

**East Midland.** Malgraŭ nefavora vetero, 47 ĉeestis en Swanwick je 15 Marto, kaj pasigis tre ĝuplenan tempon. Aparta interesaĵo estis la ĉeesto de S-ro Klyeldsen el Danujo. La venonta konferenco okazos en Nottingham ĉe Pentekosto.

**Lancashire and Cheshire.** La 5an de Aprilo okazis tre ĝuinda kunveno en Oldham, kun oficiala bonveno de la Urbestro, Konsilanto I. Crabtree. Prezidis S-ro J. D. Applebaum, kaj ĉeestis 50. La venonta kunveno okazos en Longridge, apud Preston. Detaloj sekvos. Oni anoncas konkurson por gejunuloj ne pli ol 15-jaraj je 1 Aŭgusto. La unua premio estos kongreskarto kaj vojaĝelspezoj al la kongreso en Oksfordo, kaj doniĝos ankaŭ 2-a kaj 3-a premioj. Kandidatoj devas loĝi en la Federacia regiono. Detaloj ĉe F-ino A. Hurley, 38 Hilary St., Burnley.

**Southern.** Oni aranĝis okazigi la venontan kunvenonon je 3.0, la 10an de Majo, en Alton. Benkĉaro de

Portsmouth kostos 3/6. Plenaj detaloj ĉe S-ro W. H. Bow, 41 Kirby Road, N.E., Portsmouth.

**South Wales and Monmouth.** Venonta Konferenco, Cardift, 26 Aprilo, en Amika Kunvenejo, 10 Charles St. Teo 4.30 ĉe Kafejo Dormie, Andrews Arcade, Queen St.

**Okcidenta Aŭstralio.** Je 8-14 Oktobro okazis okcidentaŭstralia kongreso, en Perth. Laŭ raportoj ricevitaj la programo estis plena kaj tre interesa. Oni raportis progreson en diversaj gravaj rondoj. Ekz., la Universitato de O.A. elektis komitaton por esplori la valoron de Esperanto. La komitato rekomendis, ke la universitato akceptu Esperanton kiel temon por ĝiaj publikaj ekzamenoj en 1931. S-ro Chubb, direktoro de Edukado en O.A. intencas proponi ĉe la kunveno de Direktoroj de Edukado de Aŭstralio okazonta en Majo, 1930, ke Esperanto estu temo de deviga studado en ĉiu aŭstralia lernejo. Ni esperu!

## MOVADO GRUPA, KURSA, LOKA.

**Bath.** Je 8 Aprilo S-ro W. M. Appleby alparolis la Rotarian Klubon.

**Birmingham.** (Y.M.C.A., Dale End, 7-9.30). Majo 7, Parolado. 14, Komuna kantado. 21, Interparoletoj. 28, Vira vespero.

**Bury.** Je 19 Marto S-ro W. B. Currie alparolis la Rotarian Klubon. Bonega raporto en *Bury Times*, 22 Marto.

**Croydon.** Nova kurso sub S-ro T. H. Saxon. Kunvenoj Marde, 7.30, ĉe Dennett Hall, Dennett Road.

**Dundee.** La grupo nun atingis 50 membrojn, kaj multaj aliaj interesiĝas. Nova kurso okazas en Blairgowrie, kaj unu por skoltoj en Monifieth. Krom tio, multaj libroj vendiĝis al vizitantoj.

**Edinburgh.** La ĉiujara raporto montras saldon de £33, kaj kreskon de membraro ĝis 165, ŝuldata al daŭra kaj serioza penado de multaj laborantoj. Je 17 Majo oni ekiros de Colinton Car Terminus (3.0) por ekskurso al Currie.

**Hull.** Je 3 Aprilo okazis kunveno, kiun ĉeestis 70 geinstruistoj. S-ro G. W. Roome prelegis pri la temo "Esperanto kaj la lernejo," kaj vekis multe da intereso.

Sinceran dankon al S-ro A. E. Wood kaj aliaj amikoj, kiuj per disdono de 1200 flugfolioj kaj alimaniere sukcesigis la kunvenon.

**Letchworth.** S-ro J. Leakey parolis je 12 Marto al la Franca Rondo pri siaj spertoj kiel 80-jara Esperantisto dum vojaĝado en la Acoroj, Casabianca, Dakar, Sierra Leone, Secundi, Tangiers, kaj Funchal.

**London (Central).** Kunvenoj marde kaj vendrede 6.30-10.0 ĉe 170 Fleet Street, E.C. De la komenco de Majo okazos kurso pri Esperanta Stenografio, vendredvespere.

**London, New Southgate, N. 11.** Esperanta kurso ĉe Friends' Meeting House, Waterfall Road, 3.0, sub S-ro L. Jenkins.

**London, North.** The inaugural meeting of the North London Esperanto Club will be held on Tuesday, 29th April, 1930, at 8.0, at The Broadway Cafe, Green Lanes (Near Bowes Road), Palmers Green, London, N.13. In the Chair: Mr. R. Robertson, F.B.E.A. At this meeting members will be formally enrolled, and officers and committee elected. The activities of the Wood Green Esperanto Society will be continued in the wider sphere of the new club. Classes are being arranged in all grades, and the life of the club will be welded together by a series of social events, including week-end rambles. North London Esperantists should attend in force to give the venture a worthy send-off. Enquiries should be addressed to the acting secretary, Mr. R. Murray, 34 Evesham Rd., New Southgate, N.11.

**London, W.C.** Kurso por membroj de la N.U.W.T. komenciĝos je la 30a de Aprilo, ĉe 39 Gordon Square, el 6.30. Instruisto: S-ro M. C. Butler.

**Nottingham.** Aliĝis al la ekzamenoj de la East Midlands Educational Union 24 kandidatoj por la elementa grado, kaj 9 por la supera grado.

**London, Walthamstow.** Nova kunvenejo: Working Men's Hall, 82 High Street, E. 17, ĵaŭdvespere, 8.15.

**Rotherham.** S-ro J. Merchant alparolis la Rotarian Klubon je 9 Aprilo.

## MOVADO FAKA.

**Birdprotekto.** La Reĝa Societo por la Protekto de Birdoj eldonis belan glumarkon en Esperanto por atentigi pri la grandega perdo de birda vivo kaŭzata de olea forĵetaĵo el ŝipoj. Petu literaturon kaj glumarkojn ĉe S-ro Lemon, R.S.P.B., 82 Victoria St., S.W.1.

**Edukado.** La sekretario de Royal Society of Arts (la plej granda ekzamena korporacio en Britujo) anoncas, ke de Pentekosto, 1931, la R.S.A. starigos ekzamenojn en Esperanto. Ni atentigos pri tio jam nun. kaj esperas, ke niaj kursestroj subtenos tiun tre gravan antaŭenpaŝon per provizo de kandidatoj.

Mrs. L. Manning, the President-elect, of the N.U.T., has joined the T.A.G.E.

La ĵus eldonita broŝuro "Esperanto in the School" enhavas preseraron (p. 6, 1, 19 de malsupre). La statistiko citita donis informojn pri 4478 Esperantistaj instruistoj (ne 447). La nombro nun atingis preskaŭ 5500.

A Deputation from the Scottish Federation visited the Right Hon. W. Anderson, M.P., Secretary for Scotland, on April 4th, to advocate the introduction of Esperanto into all schools professing three years' post-primary courses. A very convincing and full presentment of the case was spoken to by Mr. W. M. Page, Mr. Warden, Mr. W. Harvey, Mr. D. Kennedy, Miss J. Baird, and Miss Isa Watson. Several questions were asked and answered. Mr. Anderson expressed his interest in the idea of an international language, and promised that the views of the Deputation would receive sympathetic consideration. The Secretary of the Department, Mr. McKechnie, stated that it was important that teachers should themselves through their organisations make representations to the Department.

**Medicino.** La gazeto *Internacia Medicina Revuo* en la nuna numero kompletigis sian "Provo de Teknika Medicina Vortaro." Kelkaj ekzempleroj de tiu vortaro estas nun haveblaj, po unu dolaro, ĉe D-ro M. Briquet, 48 Boulevard Montebello, Lille, Francujo. Ni forte rekomendas tiun verkon al ĉiu interesita pri teknikaj terminoj.

La gazeto mem estas modele eldonita, kaj meritas pli fortan subtenon, ol ĝi ricevis ĝis nun en nia lando. Ni konsilas, ke ĉiu Esperantista medicinisto abonu al I.M.R. ĉe M. Wittenberg, 31 Kleist-strasse, Berlin, W 62, Germanujo, po unu dolaro. (Abonoj komenciĝas de la komenco de la jaro, kaj la gazeto aperas ĉiun duan monaton).

**Rotario.** S-ro F. H. Lockyer, 56 Arley Street, Liverpool, deziras adresojn de ses pluaj Rotarianoj por internacia korespondo rotaria en Esperanto.

**Scienco.** La Angla Sekcio de la Internacia Scienca Asocio Esperantista eldonis kvarpaĝan folion titolitan "Esperanto and Science." Ĝi estas interesa resumo de la utileco de nia lingvo en la kampo de scienco, kaj oni esperas, ke ĝi logos novajn rekrutojn en tiun fakon de nia movado. Ĉiu, kiu povas utile disdoni ekzemplerojn de tiu folio, skribu por ili rekte al F-ino E. A. Mann, 87 Earlham Grove, London, E.7. Oni aldonu almenaŭ poŝtmarkojn por pagi la poŝtelspezon.

## ESPERANTO SUMMER HOLIDAYS.

**July 5th-12th. Oostduinkirke-sur-Mer, Belgium.** This was such a happy holiday last year that we are repeating it. Accommodation in a good hotel right on

the sea front. Meetings, concerts, rambles, community singing, dances, etc. Total cost from London, including fares, accommodation and food, **£4 : 15 : 0.** Possible visits to Bruges and other places at a small extra charge.

**August 26th - September 3rd. B.E.A. Party to Como, Italy.** A most attractive programme has been arranged, in conjunction with the Italian Esperanto Congress, which will be held in Como from August 30th to September 2nd. Price, including good accommodation, all meals, tips, amusements, guides and guide-book, visits to Brunate, Milan, Ĉartrozzo de Pavia, Fiumelatte, and the three lakes, and 2nd Class travelling from London to Como and back, **£12 : 15 : 0.**

**Very Important.** These parties are open only to B.E.A. members. Accommodation is limited, so early application is essential. You can book now by paying **£1** deposit; the balance to be paid by instalments or in one sum not later than two weeks before the date of departure. *Reduced Fare Vouchers from the Provinces will be available.* Full particulars from the B.E.A. Enclose stamped addressed envelope.

## MORTOJ.

**Godman.** En mezo de Marto, S-ro Oswald Godman, el St. Albans, dum multaj jaroj entuziasma Esperantisto.

**Ireland.** Je 18 Marto, en London, Elizabeth B. Ireland, de 10 Eaton Road, Hove. Ŝi estis Dumviva Fratulo de la B.E.A., kaj fervora laboranto por nia Afero. Inter aliaj libretoj ŝi verkis *Esperanto in Twelve Lessons*, sub plumnomo "Stella."

**Millar.** En Marto, S-ro Millar. Dum kelkaj jaroj li instruis Esperanton en Bolton.

## VARIOUS.

**Divine Service in Esperanto** will be held on Sunday, May 11th, at 3.15, in St. Ethelburga's Church, Bishopsgate, London, E.C.2., when the speaker will be Mr. D. H. Davis, and the soloist, Mr. H. Webb. Tea at Great Eastern Hotel, Liverpool Street. Owing to the Nottingham Congress there will be no Esperanto Service in June.

**"The Newspaper of To-Morrow."** In this book Mr. Harold Herd forecasts great developments: "The Press will have an opportunity of satisfying the needs of millions of people eager for culture—there may be scope for a daily world newspaper, published in the morning in London, reaching 220,000,000 English-speaking people in the evening, and with *an Esperanto edition for other languages.—The Printers' Register, March 6th.*

**The World Message of the Children of Wales** will be broadcast this year for the ninth time on 18th May. The official text is printed among other languages in Esperanto. Those interested should communicate with the Rev. M. Davies, 10 Museum Place, Cardiff.

**Congratulations to Mr. and Mrs. Alfred Griffin,** of Gordon Villa, Prescot Road, St. Helens, on their golden wedding on March 31st. Mr. Griffin is the honoured pioneer of our movement in his town.

**Interlerneja korespondo.** Fondiĝis en Parizo "Konstanta Komitato por Internacia Interlerneja korespondo." Ĝis nun oni aranĝis korespondadon nacilingve en sep landoj. Oni nun konsentas peradi Esperantan korespondadon. Sendu leteron al S-ino M. Nieuwenhuis, 44 Jan van Goyenstraat, Leiden, Nederlando, citante nomon, sekson, lernejon, adreson, ĉu instruisto aŭ lernanto, profesion de patro aŭ edukanto, kaj temon, pri kiu vi volas korespondi.

## THE ESPERANTO TALKING FILM COMES TO BIRMINGHAM.

**On Sunday, 11 May, at 3.30, in the Futurist Theatre, Birmingham, Paramount Pictures will show a short talking film in Esperanto. Admission free by ticket.**

## VERKOJ RICEVITAJ.

**La Stokholma Ekspozicio, 1930.** Lukse eldonita gvidlibreto al la urbo kaj la ekspozicio. Eldonita de la Sveda Trafika Asocio kaj la Stokholma Ekspozicio.

***Leakey's Introduction to Esperanto.** Nova eldono: deka milo; 4p.

**Jen la Homo.** P. Dânov. 32pp. Biblioteko "Nova Kulturo." Serio 2, N-ro 1. Por la tuta serio, 3 sv. fr. La unua serio, tole bindita, 4 sv. fr. Ĉe J. Panajotov, Opalĉenska 66, Sofio, Bulgarujo.

***Malriĉa knabo, kiu gloriĝis.** Biografio de T. G. Masaryk, Prezidanto de la ĉeĥoslovaka respubliko. D-ro Jan Herben. 136pp., 2ŝ. Tute rekomendinda.

***Kenngott's Esperanto Course.** An Esperanto Course by A. Kenngott, A.M., Department of Romance Languages, University of Texas. 179pp., 4ŝ., fortike bindita, preso kaj papero bonaj. 18 lecionoj, kun ekzercoj, suplementaj notoj, kaj du vortaretoj. Dudekminuta legado diverspaĝe montris nenion kritikindan. Aparte utila al persono, kiu serĉas libron klare kaj grandlitere presitan.

**Novial Lexike.** Otto Jespersen. 251pp., 3/6. Vortaro de la projekto "Novial," kun antaŭparolo kvinlingva. Mendebla ĉe B.E.A.

***Esperanto and Science.** 4pp. Senpage (sendu markon por afranko), ĉe F-ino Mann, 87 Earlham Grove, London, E. 7.

***Esperanto in the School.** 8pp., 1p. 12 por 9p.

**XXIa Brita Esperanta Kongreso,** Nottingham, Junio 6-9. 36pp., bele presita kaj ilustrita. Senpage por kongresanoj.

**Pelny podstawowy slownik jezyka miedzynarodowego Esperanto.** (Plena Fundamenta vortaro de L.I. Esperanto). Esperanto-pola vortaro de Jan Zawada. 116pp., ĉe Societo "Laboro-Praca," ul. Marszalkowska 81m., adw. Litauera, Warsaw. Prezo ne montrita

**La Paca Mondo de Virinoj.** Liu Jen-Hon. Trad. Iĉio Sun. 22pp., prezo ne montrita. Ĉe Feminisma Mondpaca Asocio, 71 Rue Marcel Tillot, Shanghai. Interesa kaj originala proponaro.

**Internaciaj Konvencioj pri Fervojaj Person-Pakaĵ-kaj Fretaĵ-trafikoj.** Trad. J. Rebiĉek. 253pp., kun diagramoj kaj formularoj. Valora dokumento por ĉiu interesita pri trafikaj problemoj kaj pri teknika terminaro. Nur 200 ekz. estas presitaj. Prezo ne klara. Skribu al Josef Rebiĉek, Estro de komerca departemento de ŝtataj fervojoj, 103 Hlavni nadrazi, Olomouc-2. Ĉeĥoslovakujo.

***Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto.** La malnovaj *Esperanta Sintakso* kaj *Esperanta Vortfarado* de P. Fruictier, kunmetitaj en unu volumon, reviziita kaj kompletigita de S. Grenkamp-Kornfeld. 200pp., 4/6. Libro tre helpa por ĉiu lernanto, kaj preskaŭ necesaĵo por la serioza progresinto.

**La Eterna Evangelio. (1) La interhoma amo.** H. J. Patiala, Aurakatu 14, Turku, Finlando. La unua el serio. Prezo: 2 finnaj markoj, (4p.)

**Mallongaj Prozaĵoj de diversaj aŭtoroj,** en stenografio duploja. Prezo: unu respondkupono, ĉe P. Flaguel, 9 Bd. Voltaire, Issy-les-Molineaux, Seine, Francujo.

Books starred are stocked by the B.E.A. Postage extra. Others should be ordered not from the B.E.A., but from the address given.

## B.E.A. BIBLIOTEKO.

La Bibliotekisto danke ricevis donacojn de materialo de S-roj G. Wilson Burn kaj L. N. Newell. Helpo per sendo de fotografaĵoj, libroj, kaj ĉio kun Esperanta intereso, estos bonvena, kaj aparte monhelpo por bindado de libroj.

### DEZIRAS KORESPONDI.

**Japanujo.** S-ro H. Hameyama, *Shizuoka High School, (Toshoka), Shizuoka City, Shizuoka-ken* kun ĉiuj britoj laŭdezire.

**Nederlando.** S-ro C. Grol, *51 J. Vijghstraat, Nijmegen*, 22-jara, romkatoliko, librotenisto, prefere kun samaĝulo scianta iomete la germanan.

---

## The British Esperanto Association (Inc.),

142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C. 1.

## Official Notices.

### AFFILIATION OF NON-ESPERANTO BODIES.

At the Council Meeting of 12th April, the following resolution was passed for consideration :—

At the Council Meeting of the 12th April it was agreed to recommend to the Annual General Meeting the formation of a register of Associated Bodies on the following lines :—

"Any Club, Society, Association, Chamber of Commerce, or other organised body, wishing to express sympathy with the aims of the Association, may, with the sanction of the Council, be enrolled in its corporate capacity as an Associate Supporter, on payment of a fee of not less than One Guinea per annum. A body so enrolled shall receive such official documents of the Association as the Council may from time to time decide to supply, but shall not have any voting or other rights in the affairs of the Association, or derive any financial benefit from its enrolment, and such enrolment shall not in any way imply the adherence of the Association or of the Council to any principles governing the constitution, administration, or policy, of the body concerned."

### BRITISH CANDIDATES TO THE LINGVA KOMITATO

The Council intends to draft a suitable list of English-speaking candidates for membership of the Lingva Komitato for use when vacancies occur, and invites suggestions for this purpose, to be received before 1st October.

### CANDIDATE FOR FELLOWSHIP.

Charles Dawson Baxandall, *Wallasey*

### NEW AFFILIATED GROUP.

*Wheatley Hill Esperanto Society*. Secretary, C. R. Moore (Jr.), 1 Alexandra Terrace, Wheatley Hill. Meetings on Wednesdays, 7-9, in Wheatley Hill Senior Boys' School.

### NEW DELEGATE COUNCILLOR.

*Exeter*. J. C. Pleace.

### CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

T. F. CONNOLLY, M.Sc., F-inst P., 45, Dryburgh Road. Putney. H. CUNLIFFE, Friends' School, Sibford, nr. Banbury. SAMUEL H. FOMISON, 213 King George Road, S. Shields. F-ino ELIZABETH H. FOX, 26 Hull Road, Withernsea. JOHN GREEN. 2312308 Signalman, "A" Corps Signal. Karachi. India. HERBERT C. HAMMOND, 6 Temple Dwellings, Temple Street, Bethnal Green, London. E. JONES, 59 Montalt Road, Woodford Green, Essex. WILLIAM KENT, 9 Crossflat Crescent, Paisley. LAWRENCE J. KIERAN, 14 Rue Gioffredo, Nice, France. F-ino DORIS L. MATTHEWS, 141 Woodlands Road, Barry, Glam. DAVID ROSS, 6 Sandeman Place, Dundee. EDWARD H. SETTLE, 3 School Grove, Withington. Manchester. GEORGE STANSFIELD, 97 Old South Lambeth Road, London, S.W. 8. WILLIAM VARLEY, "Belpenso," Old Earswick, York. F-ino GRACE WADHAM, 19 Grandison Road, London, S.W. 11. FRANK WATTERS, 7 Markville Gardens, Caterham. Surrey. F-ino MARY WHITHAM, 1161 East Burnside, Portland, Oregon, U.S.A. F-ino IVY V. YEOMANS, 25 Ashmore Road, Kings Norton, Birmingham.

*Correction to name in previous issue:* HUBERT C. S. COLBORNE, 25 Devonshire Terrace, Hastings.

### DONATIONS TO B.E.A., March, 1930.

**Capital (50,000 Shilling) Fund:** Kingstona Rondiranto 4; H. L Hodges 5. TOTAL: 19,658 shillings.

**General Funds:** Anon. per Miss Bew, £3; Mrs. D. H. Morris, £1 : 7 : 6; Miss E. Young. £1 : 5 : 0; Mrs. K. Sherris, Mrs. Haliday, 7/6; Prof. W. E. Collinson. Miss Borel, Miss Holness, G. Scott, F. S. Watkins, 5/-; Miss Swan, L. W Claxton, F. H. Bolton, W. Buchan, N. M. Bell, H. L. Gandell, 2/6.

**Guarantee Supplementary Fund:** O. E. Sachse, £1.

**Motor Car Expenses:** Miss Wallis, 2/6.

### B.E.A. GUARANTORS, 1930.

| | £ | s. | d. |
|---|---|---|---|
| Previous Total (adjusted) ... ... | 362 | 4 | 0 |
| Bevan, G., Wrexham ... ... | | 10 | 0 |
| Carson, R. L., Hull ... ... | | 5 | 0 |
| Currie, W. B., Burnley ... ... | | 10 | 0 |
| Everest, Arthur, Reading ... ... | 1 | 0 | 0 |
| Lasser, A., Chicago... ... ... | | 10 | 0 |
| Marsh, E. H., Tunbridge Wells ... | | 5 | 0 |
| Powers, Miss N. E., Windsor ... | | 10 | 0 |
| Rowe, H., Burnley... ... ... | | 10 | 0 |
| Wilkie, M. C., Leith ... ... | | 5 | 0 |
| Wilkins, W., Finchley ... ... | 3 | 0 | 0 |
| Bristol Esperanto Society ... ... | | 10 | 0 |
| Iyer, T. D., Addis Ababa ... ... | | 5 | 0 |
| Total (Minimum required, £500) | £370 | 4 | 0 |

### EXAMINATIONS

Will be held at the Offices of the Association, 142, High Holborn, London, W.C. 1, as follows :—

*Advanced:* Friday, 16 May, 6 to 9. *Fee*, 3/-.

*Preliminary:* Friday, 16 May, 6.30 to 8.30. *Fee*, 1/6.

*Candidates should give notice of intention to sit.*

M. C. BUTLER, Secretary.

---

### PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*David S. Hood, *Arthur Malkin, *Henry Taylor, *Robert A. F. Bruce, *Andrew Adamson, *Thomas H. Wright, *Isabella G. Clark, *Elizabeth E. Telford, *May Young, *Margaret Worthington, *Margaret L. Inglis, Reginald Malkin, Margaret A. Walls, Catherine Cameron, Mrs. Edith M. Weierter, *Edinburgh*; Isabella Bell, *Mary Edwards, *T. Smith, *Robert G. K. Bannatyne, William Cadden, Mary M. D. V. Chisholm, Lindsay Wilson, James McCredie, John Paterson, *A. Downie, *Elizabeth R. G. Taylor, *John S. Martin, *Alexander McConnell, Henry V. Monaghan, Catherine MacLean, *Glasgow*; Doreen Foster, *Fred Hughes, Mrs. Amy R. Reardon, Henry F. Payne, William S. Clark, William G. Chant, Henry W. Chant, Leslie M. Sanders, *Gwendoline L. Lucas, Ruth Bowthorp, Mrs. R. S. Neal, *Vera E. Trueman, Mrs. L. C. Hinkley, *Gertrude Hamblett, *London*; Joseph Cummins, Evangeline R. Vaughan, *Nancy E. Shore, Mary A. Grundy, *James Tarrant, Robert Porter, *Manchester*; *Mrs. Elizabeth Boardman, *Salford*; Mrs. Rosetta Haines, *Middlesbrough*; *Alexander Macdonald, *Andrew C. Ferguson, *Mrs. Margaret Shaw, John Clark, George Gourlay, Margaret W. Wyllie, *Paisley*; John Yuill, *Renfrew*; *William D. Johnston, *Kilbarchan*; Andrew Millar, *Reginald F. Jervis, Alec. H. Phillips, *Saltcoats*; Edward L. Scott, *Cheadle Hulme*; Joan M. A. Darker, *John B. West, *Westgate-on-Sea*.

### PASSED ADVANCED EXAMINATION.

*George Kidd, *Bognor Regis*; *George Stewart, *Walter Barnfield, George K. Blain, Mrs. Hilma Harley, *Glasgow*; *Henry Yarwood, Rose A. Davey, *Dr. A. R. Maclurkin, *Albert H. Portch, Alec. Venture, Grace A. Wadham, John F. O'Conor, *Mrs. B. M. Newell, Harry Vincent, *London*; Thomas J. Howell, *Seven Kings*; John F. Kelly, *Thornton Heath*; *Margaret M. Crawford, *Nettie H. Wyllie, John Wyllie, Thomas Boyd, *Paisley*.

*Denotes that candidate has passed with distinction.

WM. HARVEY, Hon. Sec.,

13th April, 1930. Examination Committee.